SUKCESO DE UNUA PARTO DE LA PROJEKTO „KREADAJ LABORSESIOJ”

La 25-an de januaro en la jaro 2023, en la sidejo de la Eŭropa Centro de Interkultura Edukado (ECIE) en Vroclavo, okazis renkontiĝo por fini la unuan etapon de la "**Kreadaj Laborsesioj**" kadre de la projekto "**Feliĉaj, kreivaj kaj aktivaj**". Ĝi estas aŭtora projekto de Małgorzata Komarnicka, prezidantino de ECIE, kaj ĝi estas financata de la Urbo de Vroclavo.

La celo de la *Kreadaj Laborsesioj* estas ilustri legendojn el diversaj mondanguloj, kiujn rakontas invititaj esperantistoj. La tasko estas malfacila, ĉar ĝi postulas la realigon de propraj vizioj en difinita tempo kaj la ilustraĵoj estas faritaj per diversaj artaj teknikoj.

La renkontiĝon partoprenis ilustristinoj, Danuta Durman-Ulatowska, Renata Gładysiewicz, Zdzisława Hampel, Joanna Kwiatkowska, Irena Solarek, Czesława Śliwińska kaj invititaj gastoj, Zbigniew Magdziarz – la Prezidanto de la Societo de Vroclavo-Amantoj (SVA) kaj Bohdan Aniszczyk - la Prezidanto de Urba Konsilantaro de Vroclavo. La kunvenon partoprenis ankaŭ reprezentantinoj de la estraro de ECIE, Elżbieta Karbowska - sekretariino kaj Elżbieta Witkowska – kasistino.

Ĉiuj estis varme bonvenigitaj de Małgorzata Komarnicka. En sia mano ŝi tenis la bele eldonitan en du lingvoj (pole kaj Esperante) la unuan volumon de la libro " **Legendy sześciu kontynentów - Legendoj de ses kontinentoj**". Ŝi emfazis, ke la libro estas resumo de la laboro de arte talentaj vroclavaj ilustrintinoj-pliaĝulinoj kaj ke ĉiu ilustraĵo bele harmonias kun la tekstoj de la legendoj.

Ĉiu ilustrintino ricevis belajn donacojn, librojn kun legendoj, grandan artan kompleton por pentrado kaj desegnado, tolojn kaj belajn diplomojn, kiujn projektis Irenka Solarek.

La prezidantino ankaŭ dankis al ĉiuj, kiuj kontribuis al la kreado de la libro, ŝi rakontis pri la malfacilaĵoj, kiujn ŝi devis venki antaŭ ĝia eldono – tio estis malfacila tempo. Ŝi precipe dankis al la prezidanto de SVA, Zbigniew Magdziarz, pro ĉiuj konsultoj, opinioj kaj komentoj, kaj al profesoro Bogdan Aniszczyk pro lia helpo eldoni ĉi tiun libron. Ŝi ankaŭ dankis al esperantistoj prezentantaj la legendojn, al la provlegantoj pro la elserĉado de malprecizecoj, kaj al Emmanuelle Richard pro la profesia aspekto de la libro

Danuta Durman - Ulatowska reprezentante doktorinon Regina Kumala, estrinon de la Universitato de la Tria Aĝo (UTA) ĉe la Akademio de Korpa Edukado je la nomo de Polaj Olimpikistoj en Vroclavo enmanigis belan rozbukedon al Małgorzata Komarnicka por escepta aktivigo de pliaĝulinoj de UTA. Dankante pro la unua parto de "Kreadaj Laborsesioj", Zdzisława Hampel donacis al ŝi silkan ŝalon, sur kiu ŝi pentris belajn florojn.

La renkontiĝo estis tre sukcesa. Ĝin akompanis bela etoso kaj aperis multaj ideoj. Ĝuante bongustan kukon, kiun bakis Irenka Solarek, trinkante teon kaj kafon, ni diskutis pri la eldono de la sekva volumo de la libro kaj pri la sekva parto de "Kreadaj Laborsesioj". Ni menciis ankaŭ la ĝisnunajn ekspoziciojn de ilustraĵoj dum la "Koncerto de Premiitoj" de la 10-a Eŭropa Festivalo de Esperantaj Kantoj kaj dum la "Tagoj de Pliaĝulo 2022". Ni planis pliajn ekspoziciojn, eble eĉ en la brikdometoj "Joĉjo kaj Margenjo".

Ni estis revemaj kaj mobilizitaj por plua laboro, ni finis la kunvenon en gajaj humoroj, senpacience atendante la sekvan.

Joanna Kwiatkowska kaj Irena Solarek
Universitato de la Tria Aĝo - ĉe la Akademio de Korpa Edukado je la nomo de Polaj Olimpikistoj en Vroclavo

DYPLOM
PODZIĘKOWANIE
dla
Joanny
Kwiatkowskiej

DYPLOM
PODZIĘKOWANIE
dla
Zdzisławy
Hampel

DYPLOM
PODZIĘKOWANIE
dla
Ireny
Solarek